# LA INFORMILO

**

## INFORMBULTENO PRI ESPERANTO

**BULLETIN BILINGUE D'INFORMATION SUR L'ESPERANTO**

ELDONISTO : esperanto-federacio de ORIENTA FRANCIO

Editeur: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 NANCY -F-
PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle serie
trimestriel
4e TRIMESTRE 1976
n°16



abonnement
un an: 10F
UNU JARO: 10 F
(8 INTERN. KUPON.)

# LA VITALITE de l'espéranto... (revue de presse)




## REYKJAVIK, capitale de l'Islande, accueillera en août 1977 le 62ème CONGRES UNIVERSEL D'ESPERANTO

D'ores et déjà ce Congrès est assuré de rencontrer le plus vif succès: 400 adhésions de 38 pays à la date du 10 novembre 1976.... contre 200 à la même date l'an passé pour le Congrès Universel d'Athènes.

De nombreux départs aériens sont en préparation à PARIS, ROTTERDAM, COPENHAGUE et OSLO entre autre. Notons à cet égard que la France compte actuellement le plus grand nombre de participants inscrits.

## POITIERS, CENTRE MONDIAL DE LA JEUNESSE ESPERANTOPHONE EN 1977 ★

546 ans après sa fondation, l'Université de POITIERS réunira dans ses murs, du 9 au 16 août 1977, plusieurs centaines de jeunes espérantistes de tous pays. Cet événement sans précédent dans une ville de Province est appelé à un grand retentissement, tant sur le plan culturel que touristique. Tous renseignements sur ce Congrès peuvent être fournis par l'Organisation de la Jeunesse Espérantiste Française, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 PARIS.

**BONNE ANNEE 1977 à tous nos lecteurs !** *

## L'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO tiendra son Congrès National à GENOBLE, du 27 au 31 mai 1977. ★

Depuis de nombreuses décennies déjà, la région RHONE-ALPES compte une intense activité espérantiste et le futur Congrès de UFE ne manquera pas de drainer dans la ville olympique plusieurs délégations venues de toutes les régions françaises. Comme à l'accoutumée, le Comité Organisateur met sur pied un programme éclectique où travail et tourisme seront intimement mêlés.

## DE SON COTE, LA CITE DES DUCS DE BAR accueillera le CONGRES FEDERAL de l'EST, les 23 et 24 AVRIL 1977. ★

Pour la première fois, les espérantophones de l'Est de la France se sont donné rendez-vous à BAR-le-DUC pour les assises fédérales de leur Congrès. Cet événement confirme la vocation internationale de la "cité des ducs", déjà jumelée avec Guilford et plus récemment avec GRIESHEIM (RFA). Le Député-Maire de la ville est d'ailleurs le co-signataire de la proposition de loi tendant à introduire l'enseignement de l'espéranto à titre facultatif dans l'enseignement de second degré.

## LE PARTI SOCIALISTE ESPAGNOL ET L'ESPERANTO ★

Voici le texte de la motion récemment adoptée à l'unanimité:
"Pour qu'une véritable compréhension fraternelle s'instaure entre tous les travailleurs, il est nécessaire que ces derniers puissent entere en relation directe. C'est pourquoi nous conseillons à tous les Pays Socialistes du monde entier d'adopter l'espéranto pour les ontacts internationaux de la classe ouvrière".

**LA CHAMBRE DE COMMERCE DE MODENE (ITALIE)**, ★ a inauguré officiellement l'ouverture d'un cours d'espéranto dans ses locaux. Commencé le 27 octobre, ce cours est suivi par 53 élèves appartenant à toutes les catégories professionnelles de la ville.

**LA VILLE DE TURKU en FINLANDE** ★ vient d'éditer, et ce pour la 4ème fois un document touristique en couleurs en espéranto, intitulé: "Turku, la ville où il se passe toujours quelque chose".
De leur côté, les îles Canaries ont également diffusé un dépliant publicitaire en espéranto.

## L'ESPERANTO A LA FOIRE DE BAGDAD ★

Pour la seconde fois consécutive, les visiteurs de la fo re internationale de la grande ville irakienne ont pu se renseigner sur l'Espéranto, auprès du stand spécial aménagé à cet effet.

## UNE INTERVIEW EXCLUSIVE DU PROFESSEUR ISSAÏEV, docteur en philologie, à la revue "L'UNION SOVIETIQUE" (N°9 1976) ★

"Le Présidium de l'Académie des Sciences de l'URSS a récemment chargé l'Institut de la Linguistique d'étudier le problème d'une langue auxiliaire de communication internationale et des possibilités de son emploi dans les conditions actuelles. Les savants soviétiques arrivent à la conclusion que l'Espéranto est l'unique langue planifiée pouvant servir à la communication sur le plan international... c'est en premier lieu un moyen qui permet de surmonter les difficultés que la multitude des langues dresse sur la voie du progrès". Notons que 83 Universités et Grandes Ecoles

d'URSS ont réagi favorablement à la campagne informative du club d'espéranto de UFA pour l'acquisition de matériel d'études d'étude de la langue internationale.

L'AUTOMOBILE-CLUB INTERNATIONAL D'ESPERANTO ★ compte à présent des membres dans 31 pays. Son but est axé sur l'entr'aide des usagers de la route en difficulté (Traductions, adresses de réparateurs, etc.)
Tous renseignements aauprès de M. GUILLAUME, IEKA, 66 Village de Grasse, F 78810 FEUCHEROLLES (France).

## AL NIAJ EKSTERLANDAJ AMIKOJ

*Ni informas al niaj eksterlandaj amikoj, ke per ĉi-tiu numero finiĝas la jarabono 1976.*

*Tial, karaj geamikoj, se vi daŭre deziras ricevi nian bultenon LA INFORMILO, bonvolu senprokraste pagi vian abonon por 1977.*

*Du eblecoj:*

- *per ĝiro de 10 FF al nia pĉk: FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO,*
  *pĉk 1997 72 W NANCY Francio*
- *per sendo de 8 internaciaj respond-kuponoj al nia kasisto, S-ro André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 Francio*

*Ni kalkulas kun via fideleco! Antaŭdankon!*

## NEKROLOGO KAJ ALVOKO DE U.F.E.

Ni devas informi vin pri tre malĝojiga afero.

Nia samideano BUDIMIR de la grupo de LYON (konsiliano de UFE) revenante hejmen bicikle de la Internacia Kongreso en ATENO, estis mortigita de greka ŝoforo.

Ni devis organizi la revenon de la korpo aviadile al LYON kaj la elspezoj altiĝas je 10 500,00 FF ...

Tiu sumo estas tre grava ŝarĝo por la edzino, kiu estas oficistino kaj havas 2 filojn. S-r° BUDIMIR suferis de la ekonomia krizo kaj ne havis laboron de 18 monatoj.

La grupo de LYON organizas monkolekton por tiu malfeliĉa familio kaj ni petas vin helpi por tiu solidara agado. Bonvolu peti donacojn al viaj membroj kaj sendi ĉekojn al:

*SOCIETE ESPERANTISTE DE LYON*

*CCP 2-4444-99 LYON*

Dankon antaŭe, Sincere,

La Konsilio de UFE

# cotisations 1977

Vous venez de recevoir le dernier n° de la INFORMILO de cette année, il termine ainsi votre abonnement pour 1976.

Mais vous désirerez certainement continuer à recevoir notre bulletin. Aussi nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations pour 1977 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Vous nous faciliterez ainsi le travail, mais surtout vous vous éviterez tout retard dans l'envoi des bulletins et des revues correspondant à vos cotisations ainsi que dans l'envoi des coupons 1977 qui vous donnent droit au service des délégués de UEA. Ces coupons vous seront envoyés avec la INFORMILO qui suivra l'encaissement de votre cotisation.

Soyez donc parmi ceux qui, dès la parution du 1er n° de la INFORMILO en 1977, seront à jour de leur cotisation. Ainsi vous y trouverez vos coupons 1977 et vous n'aurez pas la désagréable surprise du rappel traditionnel!

Vous avez deux possibilités pour payer cette cotisation:

*1°/ par virement postal à: FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO*

→ *CCP 1997 72 W NANCY*

*2°/ par chèque bancaire à l'ordre de la même Fédération (Ce chèque doit être envoyé à notre trésorier, S-r° André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM)*

TABLEAU DES COTISATIONS 1977

| | - de 22 ans | + de 22 ans |
|---|---|---|
| 1 - *ABONNEMENT SIMPLE A "LA INFORMILO"* | 10 F | 10 F |
| *Abonnements groupés (5 ex. à une seule adresse)* | 35 F | 35 F |
| 2 - *ADHESION A U.F.E. (Union Française pour l'E°)* | | |
| *= membre "Ami de l'E°" minimum* | 17 F + 10 F | 17 F + 10 F |
| *= membre titulaire junior (reçoit "Franca Esperantisto")* | 51 F + 10 F | |
| *= membre titulaire (+ de 22 ans) reçoit aussi "FE"* | ——— | 70 F + 10 F |
| *= membre sympathisant* | 17 F + 10 F | 17 F + 10 F |
| 3 - *ADHESION COUPLEE A UFE et à UEA* | | |
| *= membre individuel (reçoit "FE" et l'annuaire de UEA)* | ——— | 107 F + 10 F |
| *+ la revue KONTAKTO si moins de 25ans* | 88 F + 10 F | 107 F + 10 F |
| *= membre individuel (reçoit "FE", l'annuaire de UEA et la revue mensuelle mondiale "ESPERANTO")* | ——— | 162 F + 10 F |
| *+ la revue KONTAKTO si moins de 25 ans* | 143 F + 10 F | 162 F + 10 F |
| 4 - *MEMBRE DE LA SOCIETE ZAMENHOF (à rajouter aux cotisations ci-dessus)* | 184 F | 184 F |

**IMPORTANT**

A - Tous les membres recoivent le bulletin trimestriel régional "LA INFORMILO", les cartes de membre de UFE et de UEA (pour les nouveaux adhérents) ainsi que les coupons 1977 donnant droit aux services des délégués mondiaux.

B - Les membres de l'enseignement sont invités à mentionner leur profession car ils seront ainsi d'office inscrits au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE)

C - Les jeunes gens jusqu'à 25 ans doivent mentionner leur date de naissance et ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE (JEFO), ils pourront recevoir en plus le bulletin "Koncize" (voir cotis. spéciales)

D - Les membres qui payent leurs cotisations par l'intermédiaire du GEE ou de JFEO ainsi que les membres à vie, sont priés de payer à part uniquement l'abonnement à la INFORMILO (10F) comme indiqué précédemment.

E - Exceptionnellement, les membres du groupe de STRASBOURG, dont la trésorière est S-in° Stahlberger Madeleine, 17 rue de Lampertheim, 67800 BISCHHEIM, sont priés de verser leurs cotisations au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, ccp 499 17 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au Groupe qui s'élève à 10F.

---

*VOUS POUVEZ ÉGALEMENT choisir un abonnement aux revues suivantes entièrement rédigées en espéranto et le régler à notre trésorier qui transmettra:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| ESPERANTO | 5 (revue officielle de UEA) abonnement simple | | 55 F |
| KONTAKTO | revue pour la jeunesse (adolescents) | 1 an, 4 nos | 28 F |
| KONCIZE | bulletin européen pour jeunes gens | 1 an, 6 nos | 10 F |
| KULTURAJ KAJEROJ | revue culturelle | 1 an, 6 nos | 25 F |
| HEROLDO DE ESPERANTO | revue d'information format journal | 18 nos par an | 48 F |
| HOMO KAJ KOSMO | revue de vulgarisation scientifique | 1 an, 4 nos | 9 F |
| LITERATURA FOIRO | revue littéraire | 1 an, 4 nos | 20 F |
| SCIENCA REVUO | | | 29 F |
| JUNA AMIKO | dans un style simple pour débutants | | 8,50 F |
| MONDA KARUSELO | nouveau magazine en E° | | 10 F |
| HORIZONTO | | | 40 F |

Les revues ci-dessus sont neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.
Celles qui suivent peuvent être considérées comme "engagées":

| | | | |
|---|---|---|---|
| OOMOTO | revue japonaise (philosophie religieuse) | 1 an, 6 nos | 26 F |
| ESPERO KATOLIKA | | 1 an | 27 F |
| FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO | | 1 an | 10 F |
| DIA REGNO | internationale, protestante, | | 35 F |
| SAT-AMIKARO | bulletin mensuel des trav. espér. franç. | | 42 F |
| SENNACIULO | même tendance mais internationale | 1 an | 50 F |
| EL POPOLA ĈINIO | mensuelle, en couleurs, | 1 an | 10 F |
| | | 2 ans | 15 F |
| | | 3 ans | 20 F |
| INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO | | | 14 F |
| BIBLIA REVUO | | | 30 F |

— En outre il est également possible de commander à notre trésorier




Des feuillets de propagande comprenant 9 vignettes collantes (4X3 CM) avec l'inscription "Esperanto, Universala Lingvo" et une étoile verte. Chaque vignette comporte en outre un texte différent comme le montre la reproduction ci-contre.

| | |
|---|---|
| 2 feuillets (18 vignettes) | 1,50 F |
| 15 feuillets (135 vignettes) | 10,00 F |

Les livres suivants:

| | | |
|---|---|---|
| AMUZAJ DIALOGOJ | (Lienhardt) excellent pour une pratique de la langue parlée | 11 F |
| LEXIQUE FONDAMENTAL E° -FRANCAIS | (Léger) | 11 F |
| MI AMIS JUNULINON | Correspondance d'un pasteur avec un jeune africain sur les problèmes de l'amour et de morale sexuelle | 11 F |

( prix indiqués "franco", en vigueur au 15 11 76, peuvent être modifiés )

---

Viajn tekstojn por la venonta INFORMILO vi sendu al la redaktoro antaŭ la 30a de januaro 1977.

AGADI !... Jen grava verbo por ĉiu homo ĝenerale kaj aparte por ĉiu Esperantisto. Nenio sen peno, eĉ Esperanto. Kiel Zamenhof mem diris: "Kiu mem ne penas, nenio al li venas!"

LERNI LA LINGVON, eĉ ellerni ĝin, ĉar oni uzas nur tion, kion oni bone konas: estas vere pri ĉio, kaj do ankaŭ pri Esperanto. Esperanto estas lingvo kiel nia nacia lingvo, kiun ĉiutage ni uzas, ĉiutage ni lernas. Kiam mi troviĝas antaŭ nova vorto aŭ nekonata vorto, mi ne hontas malfermi la vortaron por ekkoni la nekonataĵon. Ni ne hontu malfermi ankaŭ nian esperanto-vortaron aŭ nian gramatikon aŭ lerno-libron por lerni, plie kaj plue lerni. Ĉu koncerne esperanton ni havas la saman respekton, kiun ni havas koncerne nian gepatran lingvon? EStante komencanto ni bone lernu la unuagradan kurson sed atinginte la finon, ni daŭrigu la studon per la duagrada kaj, kial ne, eĉ per la triagrada kurso. Ni uzu la kursojn, eĉ ni abuzu ilin! miesperas, ke ĉi-jare pluraj federacianoj komencos kaj ... finos la studon de la libro de Ribot por sukcese trapasi la ATESTON PRI KAPABLECO. Do al laboro, kuraĝe, sentime, senlace, sen forgesi la organizitajn staĝojn kaj semajnfinojn; sen forgesi ankaŭ nian nacian domon "GRESILLON" en BAUGE kaj la fondumon Edmond PRIVAT en Svislando.

UZI LA LINGVON, sen timi paroli per ĝi. Ĉi-tie mi citu kelkajn frazojn de Zamenhof: "Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli en esperanto, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la "esperantistoj-balbutantoj" malgraŭ vole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria ol praktika". Ĉi-tiu teksto kuŝas en la bona libro de W. AULD, "Paŝoj al plena posedo", ĉe la paĝo 158, libro leginda kaj legenda, lerninda kaj lernenda! Ĉiufoje kiam okazo sin prezentas al ni, profitu ĝin por paroli en Esperanto kaj ne nur pri Esperanto. For la "krokodilantojn"! Esperanto ne nur estas teoria sed ankaŭ kaj plie praktika!

AUSKULTI RADIO-ELSENDOJN. Kelkfoje oni povas demandi, ĉu la esperantistoj sufiĉe fieras pri la sukcesoj desia lingvo. Jes, Esperanto ankoraŭ ne estas multe konata, nesufiĉe parolata, neege agnoskita de la registaroj. Tamen Esperanto estas nun afero de radio-elsendoj. Ĉu Esperantistoj rezervas tempon por ilin aŭskulti? Varsovio, Romo, Berno, Vieno, Vatikano, ktp ? Estas ankaŭ bona okazo por alkutimigi la orelojn al la aŭdado kaj kontroli la bonan akcenton kaj prononcadon internacian.

SKRIBI AL RADIO-STACIOJ, kiuj elsendas en esperanto. Ili faras gravan laboron por kaj per Esperanto. Nur se la aŭskultantoj regule kaj amase skribas, ili povos daŭrigi sian bonegan taskon. Se ni fieras pro nia lingvo, ni kuraĝos skribi por ĝi.

REKLAMI LA LINGVON kun entuziasmo kaj senlaceco. Reklami per la buŝo per la skribado al jurnaloj kaj amikoj, per afiŝoj; per flugfolioj. Reklami en familia rondo, en profesia medio. Reklami en lernejoj kaj universitatoj, en ĉiuj sociaj tavoloj, ĉu sindikataj, ĉu politikaj, ĉu instruigaj, ĉu libertempaj, ktp!

INSTRUI LA LINGVON... Ĉiu el ni laŭ siaj personaj, familiaj kaj profesiaj eblecoj, provu instrui la lingvon starigante parolan kurson aŭ helpante en perkoresponda kurso. Ni devas pli kaj pli multiĝi kaj tiel ni estos pli kaj pli kredeblaj, se ne diri kredideblaj. Pli oftaj estos la lerneblecoj, pli multaj estos la lernemuloj.

ANIĜI AL NACIA KAJ INTERNACIA ASOCIOJ... "Unueco estas Forto". Ĉi-tiu principo ĉiam valoras. Ĉiu apartigo, erigo malfortigas. Esperanto bezonas fortajn, gravajn, potencajn asociojn, kiuj multobligos niajn personajn kaj individuajn agojn. Ni aliĝu al U.F.E.! Ni aliĝu al U.E.A.! Kaj kial ne fariĝi delegito de UEA, por ke la reto, unika en la mondo, ankoraŭ pli efiku, por ni persone kaj por la aliaj ĝenerale.

ALIĜI AL ALIAJ ASOCIOJ... Kompreneble. Ĉiu esperantisto rajtas aliĝi al fakaj aŭ ne-neŭtralaj asocioj, kaj tion farante li tute pravas. En la esperanto-mondo estas sufiĉe da lokoj kaj asocioj por permesi al ĉiu esti kaj labori en familia etoso. Pli ni montras la praktikecon de esperanto koncerne, se ne ankoraŭ ĉiujn, almenaŭ multajn temojn de la vivo kaj flankojn de la agado homaj.

FARIĜI ONKL(IN)O ESPERANTISTA... Fakte la geonkloj esperantistaj estas skemo por helpi junajn Esperantistojn per kunligado koresponda kun plenaĝuloj. Lernado de esperanto, aparte ĉe la infanoj, nepre postulas postan uzadon, kaj unu el la plej oportunaj rimedoj por praktika uzado estas internacia korespondado. Sed ofte la infanoj havas nesufiĉan sperton por daŭre korespondi kun samaĝuloj.

"ŜPARI NEK MONON NEK PENON!"... estas ankoraŭ parolo de Zamenhof, ĉiu grupo, ĉiu Asocio, ĉiu laboro bezonas monon kaj penon, eĉ Esperanto. Niaj kasistoj federacia, nacia, internacia, faka aŭ ne-neŭtrala atendas nian monon, kiel Esperanto kaj Esperantistoj kalkulas kun nia peno.

NI AGADU... Ĉiu laŭ siaj eblecoj kaj kuraĝo, laŭ siaj monujo kaj sperto, se estas vere, ke "en la lingvo Esperanto ni vidas la estontan lingvon de la tuta homaro" (Zamenhof). Ni bone scias, ke sen ni Esperanto ne povos venki. Sed kune, en amika etoso, kune kun ĉiuj esperantistoj tra la mondo, ni venkos... iom post iom, malrapide, sed certe, ni venkos.

Roger DEGRELLE.

## 2a INTERNACIA ESPERANTO-SEMINARIO: en NEUSTADT/WEINSTRASSE!

Ni erare anoncis en nia lasta INFORMILO, laŭ informoj ricevitaj en julio, ke tiu seminario okazos en Bendorf. Intertempe ŝanĝoj okazis en la programo kaj ankaŭ la loko ŝanĝiĝis:

*Naturamika Domo Heidenbrunnertal, HEIDENBRUNNERWEG 100 - D 6730 NEUSTADT/WEINSTRASSE*

La taga tarifo en la Naturamika Domo estas nur 17,50 DM (anstataŭ 30!). Loĝebleco en 2- kaj 4-litaj ĉambroj. La ceteraj informoj en la INFORMILO 15 estas ekzaktaj, la aldonitan aliĝilon vi resendu al SEL, Franz-Schubert-Str. 26, D 6602 DUDWEILER.

## SUKCESA KULTURA SEMAJNFINO EN JUNKERWALD.

Ĉirkaŭ 40 personoj el Germanio kaj Francio ĉeestis en kastelo JUNKERWALD la 8-an kulturan semajnfinon organizitan de SEL. La kurson por komencantoj gvidis S-r° BURGER, la 2-a gradan kurson gvidis S-in° HAUPENTHAL kaj kurso C konsistis el prelego-serio fare de S-r° Harmut TRUNTE, el BONN. Sub la ĝenerala titolo "*Enkonduko en la lingvistikon de Esperanto*" li prezentis al ni vastan superrigardon super la historio de E°, ekde la origino de la familio Zamenhof kaj la unuaj provoj de "pra-esperanto" ĝis "volapük" kaj aliaj artefaritaj lingvoj, evoluo de Esperanto, ktp, la tuto kun multaj referencoj al la pli diversaj lingvoj kaj alfabetoj. Tre altnivela kurso, en ĝi iom dronis la kompatinduloj kiuj ne posedas 5 aŭ 6 lingvojn.

La manĝoj estis agrablaj, ekde la postagmeza "kuko-kafo", poste vespere lerte aranĝita memserva malvarma manĝo, ĝis la tagmeza dimanĉa manĝo en restoracio post promenado en la arbaro. Sabate vespere ni ĝuis belegajn diapojn pri orkideoj. Gratulon al la organizintoj kaj ĝis la proksima!

Jean-Paul COLNOT

## PERKORESPONDA KURSO (unua-grada)

*Finlernis la unua-gradan kurson perkorespondan dum la pasintaj monatoj:*

- *S-r° Charles GUERRE (CHAVIGNY 54230 Neuves-Maisons) gvidita de S-r° Chapellier (57 Vigny)*
- *S-r° Claude MEIER (Wickersheim 67270 HOCHFELDEN ) gvidita de S-r° ZIPFEL (Strasbourg)*
- *S-r° René BOIBESSOT (70200 LURE) kaj S-in° Yvette VALANTIN (88600 BRUYERES) ambaŭ gviditaj de S-r° BERGEROT (Epinal)*

*Gratulojn al ĉiuj!*

*La unua komuniko pri nia kurso kaj pri la decembra staĝo estis dissendita la 21an de oktobro al 9 gazetoj. La sekvontaj komunikoj estos dissenditaj proksimumu ĉiun 3an semajnon. Jam 2 novaj lernantoj aliĝis.*

*La kotizo de nia kurso estas nun 30F por la kurso per 22 flugfolioj, kaj 45F por la kurso per libro. Informaj cirkuleroj estas je la dispono de interesataj personoj.*

*J-P COLNOT*

# nia vivo en...

## STRASBOURG ★

*La Kultura Esperanto-Centro reprenis la regulajn E-° kunvenojn en sia sidejo 1 placo Merian, ĉiujn 2ajn mardojn monate, je la 20a ĝis la 22a. La 12an de oktobro S-in°. MULLER raportis pri la UEA-Kongreso en ATENO. La 9an de novembro, S-in° OEHRI faris konferencon pri "Strasburgo, nia urbo" kun diapozitivoj.*

*Post klopodoj la urbestraro akceptis malfermi Esperanto-angulon en la nova urb-biblioteko. Eblaj donacontoj povos alsendi E°-librojn.*

## LA HINGRIE ★

*E° renkontiĝo okazis la 25/26ajn de septembro en Vogezoj (La Hingrie). Ĉeestis 14 samideanoj, inter ili 8 sarlandanoj. Bela vetero, promenado en la aŭtuna arbaro, prezentado de diapozitivoj de S-in° MULLER pri ATENO kaj BULGARIO kaj rikolto de pomoj ĝojigis la gepartoprenantojn.*

## NANCY ★

*Niaj kunvenoj rekomenciĝis la 1an de oktobro en la MJC "Etoile" en VANDOEUVRE. Ĉeestis 5 personoj. Estontaj kunvenoj okazos okazos ĉiun duan monaton, la unuan vendredon je la 20a-30 (Do la 3-an de decembro, la 4-an de februaro, ktp).*

*Kursoj en NANCY. Kurso okazos en MJC "Etoile" ĉiuvendrede je la 19a horo, ekde la 1a de oktobro. Gvidas ĝin S-in° HAUSER. Duagrada kurso okazas samloke, vendrede je la 18a. Gvidas ĝin S-r° KRAEMER.*

*En MJC Philippe desforges, 27 rue de la République, en NANCY-CENTRO, 2 kursoj funkcias marde ekde la 26a de oktobro, je la 18a30 kaj je la 20a30 (gvidas S-r° COLNOT la 2an kaj F-in° MARCHAND la 1an.*

*Alia kurso estas organizata de la SAT-rondo en Labor-rondo (1 bis, rue Drouin) sabate je la 14a30.)*

*Niaj vizitintoj. Post vizito de Profesoro NIŜIUMI, Delegito de UEA en Tokio, dum novembro 1975, ni havis la ĝojon akcepti novajn vizitantojn. Juna Usonano alvenis aviadile en Luksemburgio dum junio. Poste li biciklis , kaj survoje al ... Hungario kaj poste al Israelo li vizitis nin dum nia junia staĝo.*

*Poste, revene el Parizo trajne, F-inoj RADVANSKY (Fakdelegitoj de UEA en Budapest) ankaŭ haltis en nia urbo. S-r° DEGRELLE helpis ilin en tiu vizito.*

*Fine gesinjoroj Váli (ankaŭ fakdelegito en Budapest), post Strasburgo, vizitis nin la 3an kaj la 4an de septembro. Bela vetero bedaŭrinde ne favoris ilian restadon. Ili forveturis poste al la itala kongreso. Artistoj, grafikistoj kaj pentristoj, gesinjoroj VÁLI kunlaboras en diversaj esperantistaj gazetoj kaj S-in° Váli permesis, ke ni enpresu en nian INFORMILO-n delikatajn poemojn el ŝia plumo.*

## TOUL ★

*Nova informkunveno organizita de S-r° GREINER okazis en la Junuldomo la 22an de oktobro. Ĉeestis deko da personoj. Kvin el ili enskribiĝis por la nova kurso. En TOUL aktuale (krom la infanoj, kiuj lernas de post la lasta jaro en la lernejo de s-r° Greiner) en la junuldoma kurso 5 personoj daŭrigas la lernadon komencitan kaj 5 novuloj ekstudas. Jam trebonaj rezultoj!*

*J.P. COLNOT*

## BAR-LE-DUC ★

*Du inform-kunvenoj okazis last-tempe. Laŭ peto de la ĉi-tiea estro de la porinstruista seminario, la sonbendigita diapo-serio estis prezentita al la gelernantoj: grava sukceso ĉar 18 lerno-libroj ("Ni parolu ..." de RIBOT) vendiĝis kaj estas antaŭvidita memlernklubo.*

*Samtempe malfermiĝis 3a grada kurso vizitata de 7 personoj. La instruanto, S-r° DENIS, uzas la romanon de C. Rossetti, "Kredu min, Sinjorino!".*
*Estas notinde ke jam 5 esperantistoj el la loka klubo aliĝis al la UK en REJKJAVIKO en 1977! Cetere la loka klubo akceptis okaze de kultura vespero Stefan MacGill, instruisto el Nov-Zelando, kiu logis la 25 ĉeestantojn dum pli ol 2 horoj pere de belaj kaj diversaj sonbendigitaj diapo-serioj.*
*Plie la grupo laboras jam por organizi la venontan Federacian Kongreson, kiu okazos en BAR-le-DUC, la 23an kaj la 24an de aprilo 1977. Oni jam povas anonci, ke la programo estos ege interesa... ni aludu la "teatran vesperon" kun partopreno de la TESPA el PARIZO, kaj prezentado de kantoj en E° fare de 60 membroj de famekonata lernej-kantaro! Estas ankaŭ planitaj grava ekspozicio, preskonferenco, oficiala akcepto en la urbdomo.*

**... do, notinda dato: 23ª / 24ª de aprilo 1977 en BAR-le-DUC**

---

## ALVOKO DE LA KASISTO DE U.F.E AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ...

Por agi naciskale en tuta Francio, la Franca Unuiĝo bezonas monon kaj ankaŭ membrojn. Ĉe ŝtataj instancoj oni ofte devas respondi al tiu demando: "Kiom da membroj posedas via Asocio?"

Se oni respondas, ke en nia Asocio estas 100 aŭ 1500 membroj, tiam la naciaj instancoj opinias, ke tiu nombro, kompare kun 50 milionoj da enloĝantoj, estas neglektinda nombro (ĉirkaŭ 1/50 000 !) Tial ni ricevis kaj konigas la jenan UFE-an alvokon:

"Je la nomo de la estraro, mi devas fari specialan alvokon, por ke vi helpu laŭeble nian Asocion, kiu meritas partoprenon de ĉiuj Esperantistoj; ĉefe kiam nune ni entreprenas gravan kampanjon apud la Parlamentanoj.

Ni bezonas financan subtenon; almenaŭ neniu povus rifuzi pagi la kotizon de 15 F Estus bone ankaŭ peti tion de la lernantoj, ĉe la fino de la jara kurso.

Ni nepre devas havi kreskantan membraron, se ni volas influi la oficalulojn. Do, ni [illegible]kulas je vi, kaj esperas ke vi nepre klopodos en via grupo, ĉu parole, ĉu per cirkulero.

Kun espero kaj antaŭdanko, ni salutas vin plej sincere kaj samideane, "

La kasisto de U.F.E.
Jack-André ROUSSEAU



## jam tutmonde konata !

# GRÉSILLON ← 25-jara en 1977

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo GRESILLON, F-49150 Baugé, Francujo

Poŝtkonto: Nantes 1485 39. Tel.: dum la malfermo-periodo: (41) 89 10 34: alitempe: (40) 76 77 95.

**PASKO**: Alveno dimanĉon, la 3an de aprilo – foriro sabaton, la 9an de aprilo posttagmeze.

Renkonto de infanoj (kun akompanantoj) ★ Kiel gvidi kurson? Praktika pedagogio por kursgvidantoj.

**SOMERO: UNUA PERIODO**: Alveno dimanĉon, la 3an de julio (Interkona vespero) – foriro sabaton, la 23an de julio: Prelegoj ★ Diskutoj ★ Distro ★ Ekskursoj ★ Praktikado de la lingvo (individuigita kurso)*.

**DUA PERIODO**: Alveno dimanĉon, la 24an de julio (Interkona vespero) – foriro sabaton, la 13an de aŭgusto: Kurso por komencantoj ★ Praktikado* ★ Supera kurso ★ Manaktivaĵoj ★ Ekskursoj.

**TRIA PERIODO**: Alveno dimanĉon, la 14an de aŭgusto (Interkona vespero) – foriro sabaton, la 3an de septembro: Programo kiel en la Dua Periodo.

*Ĉiu lernanto povos praktiki je sia propra lingvo-nivelo. Interesitoj bv. kunporti la libron per kiu ili lastatempe lernis.

speciale por "**LA INFORMILO**", dediĉis poemon **sino VÁLI**, el **BUDAPEŜTO**...

# VERDA STELO

*... jen la terglobo sub miaj okuloj,*
*ĝi efektive ne estas tiom granda....*
*homa voĉo de Novosibirsk alvenas:*
*kiel vi fartas kara amikin'?*
*informo de Napoli atingis min:*
*naskiĝis al ni ora etulin'...*
*kaj la demando:*
*kiam vi nin vizitos?*
*mi edziĝos baldaŭ*
*diras la mesaĝo el Helsinki,*
*al la Prado invitas min Madrid...*
*fotoj venas kaj iras*
*amplene kaj kun fid'...*

*... antaŭ mi sur la skribotablo*
*kaj sur la muro malantaŭ mi*
*etendiĝas la tuta mondo:*
*la turoj de la Kremlo,*
*hinda telero,*
*pola lignaĵo,*
*majoliko de Nederlando...*

*... mia skribotablo estas stacidomo,*
*de tie vojaĝas tra la mondo*
*leteroj al amikoj*
*de ĉiu parto de la globo,*
*inter ni landlimoj jam ne validas...*
*nur humaneco, komprenemo, amikeco...*
*ĉar Esperanto ja tio estas.*

*Éva VÁLI*

### SOLVOJ DE LA LASTAJ KRUCVORTOJ (n° 15)

klarneto - rt - limo - ued - ar - ema
ukrejno - ofte - am - dop - oa - klik
ec - frido - gs - sinkopo - arm - eta -
[illegible]fio - oo - oto - ktp

### NOVA SILABENIGMO

an gi ib is iso je le ne no o o od aj op
po re rn ro ro ru ru sko te to ve

*el la ĉi-supraj silaboj alfabete ordigitaj vi konstruu vortojn laŭ la ĉi-subaj donitaj difinoj. la UNUA kaj KVARA litero de ĉiu vorto, legataj de supre al malsupre, elformas titolon de Zamenhof-verko.*

| | |
|---|---|
| + - - + - - | paperkorespondaĵo |
| + - - + - | antikva sankta birdo |
| + - - + - - - - | arta kaŭĉuko |
| + - - + - - - - | aparato kun peza rotacianta rado |
| + - - + - - - | speco de lako |
| + - - + - | pozitiva elektrodo |
| + - - + | aviadilo movata per reaktoro |
| + - - + | senkapaj truoj |

BONEGA IDEO POR LA FINJARAJ FESTOJ... DONACU AL VI MEM ESPERANTO-LIBRON !

*Imprimé par les soins du Secrétariat des Associations, 12 rue Voltaire, 55000 BAR-le-DUC*
*Le rédacteur: P. DENIS*
*Le Directeur de la publication: Jean-Paul COLNOT - Dépôt légal n° 245*